Praha. — En „Unuiĝo de unitarianaj virinoj“ prelegis s-ino Julie Šupichová pri Zamenhof kaj Esperanto la 12. IV. La prelego vekis grandan intereson inter 40 aŭskultantoj. Unitaria pastro s-ro Rubeš rekomendis post la prelego lerni Esperanton. — En Praha VIII-Libeň I. ad. Kynčl organizis en aŭtuno 1949 du kursojn kaj de 21-an de marto li organizis novajn kursojn komenculajn en Supera Kleriga Lernejo kun permeso de Loka Nacia Komitato (MNV) Praha VIII. Instruas Lad. Kynčl 30 komencantojn laŭ Ĉe-metodo, A. Boháčová 25 p. progresantajn laŭ Kilian-lernolibro, Lad. Kynčl en la dua kurso 25 p. komencantajn laŭ Ĉe-metodo. — Pluaj programoj de E. K.: 7. VI. Dr T. Pumpr: Kiel traduki poemojn. 14. VI. Gajaj filmoj de Ant. Slanina. — Kunvenoj ĉiumerkrede je la 20 h. Na prikopĉe 17. I-a etaĝo. — Ĝenerala kunveno de la E. K., okazinta 1. III., reelektis la ĝisnunan klub-estraron (prez. J. Šustr, sekr. F. Sviták, kasist. A. Bárčochová). Agado de la klubo vigligis kompare kun la j. 1948. Malhelpo estis kelkfoja translokigo de la klubo; la kunvenoj okazis dum 1949 en sep diversaj lokoj de Praha, ĝis fine oni trovis konstantan hejmon en la Kultura klubo de l'personaro de CNK en Prikopy. Okazis 12 komitatitaj kunvenoj kaj ĉiusemajnaj membro-kunvenoj, kiujn antaŭiris konversacia kurso, gvidata de A. Slanina. El la klub-aranĝoj estas citindaj precipe: 2. III. Danlando, kun lumbildoj (J. Vitek), 6. V. Pola vespero (prof. J. Garbar el Wrocław), 25. V. Ĝenerala kunveno, 1. VI. Puŝkin-vespero (Šustr kaj Bíró-Kvarteto el Budapeŝt), 6. VII. Kultura vespero kun R. Rosseti kaj lia edzino (Anglio), 2. VIII. Amika kunesto kun nederlanda-belga karavano, 26. X. Propaganda vespero por neesperantistoj (Dr Pitlik, Ginz, Hromada), 2. XI. Ĉs.-soveta amikeco, 7. XII. Nikolaa vespero (Slanina, prof. Vitič). — Pri la programoj zorgis i. a. Šustr, Vitek, Balda, Baldová, Lorenz, prof. Urban, Urbanová, prof. Vitič, dir. Pulchart kaj Slanina. La klubo aranĝis kelkajn ekskursojn, precipe al Liberec (Kongreso) kaj Sněžka (renkontiĝo kun poloj). Klubanoj Čížek, Janoušek, Kynčl, Boháčová, Slanina aranĝis kvin kursojn, el tio kvar ekster la klubo. Propagandaj montro-fenestroj estis en la Wilson-stacidomo (2), 3 kestetoj aliloke. Forsenditaj leteroj: 227, presaĵoj: 5150 ekz. La klubna biblioteko post unujara tenado en kelo estis lokita en la oficejo de EAĈSR kaj rearanĝita (E. Kutik k. a.). De 1941—48 perdiĝis 55 pruntitaj libroj. Pagintaj membroj en 1949: 511, el tio 90 novaj. La ĝenerala kunveno akceptis porpacan rezolucion (v. pĝ. 21) kaj sendis salutleteron al la ĉefurbestro D-ro V. Vacek. — En 1950 la klubna aktiveco rimarkinde plivigliĝis. Kulturprogramo estis ellaborita por duona jaro (ciklo de prelegoj kaj aranĝoj). La klubna junularo reorganizis sub gvidado de s. Jan Neuman kaj kunvenas ĉiuŝaŭde 18,30 en la klubejo. — Kursoj por poŝtistoj okazis de novembro 1949 ĝis aprilo 1950 en Kultura Domo Poŝtista (tř. polit. věžňů 16), komencula lunde, progresinta ĝaŭde, gvidata de s-ino Juliána Bendová por 6—12 partoprenantoj.

Prostějov. — Kurson en Popola Akademio por 27 p. gvidas s-o Stan. Jeřábek laŭ Ĉe-metodo.

Rokycany. — Komencula kurso gvidita de prez. K. Bašik finiĝis la 4. IV. kun 14 p. kiuj ĉiuj aliĝis al la loka grupo.

Svit. — Esperantistoj en la urbo kaj en la ĉirkaŭaĵo ne restis neaktivaj, kiam finis kursoj de E-instruisto Karel Šolc en januaro - februaro. E. Rondeto ZK-ROH kunvenas regule ĉiulunde je la 20 horo kaj rondeto ĉe Junulara Asocio (ĈSM) ĉiudimanche je la 13—15 horo. Prezidas Mikuláš Novák, poŝtestro. La junularan rondeton gvidas ĝia prez. Adam. Laborkunveno de Tatra-regiono okazis la 23. IV. Dr Sahliger preparolis tie planon por estonta laboro. Rekomendis amasan partoprenon en la kongreso en Brno. S-o M. Novák informis la ĉeestantojn pri aranĝo de la Somera kolegio en Svit la 5—19 de aŭgusto kaj rekomendis partoprenon ankaŭ en la ceteraj kursaroj dum la venonta somero en Doksy, Karlovy Vary kaj Rožnov.

Tanvald. — La grupo aperigis en marto unuan numeron de sia tre bele fotografie multobligata bulteno. Krom mapo de ĉirkaŭaĵo de la urbo ni legis tie ĉi plurajn artikolojn esperantlingvaj kaj eksciis el diagramo, ke dum 1949 la membroj sendis en fremdlandoj 341 korespondajojn, per kiuj ili kontaktis kun 36 landoj. La kunvenoj okazas dum majo-septembro la 1-an kaj 3-an mekredon en Tanvald (hotelo Central), la duan merkredon en Velké Hamry (hotelo Hlúže), la 4-an merkredon vespera promeno kun E-konversacio.

Trenčín. — Jarkunveno de la Loka SES-grupo la 16. III. elektis prez. Ján Lamačka, sekretario Rudolf Bušo, kasisto Vendelín Hlavatý. Kunvenoj ĉiuŝaŭde en Baza faka lernejo je la 19 h. Adreso: Pod Sokolicami 1675.

Ústí n. L. — Kurso komencula finiĝis kun 12 p., kiuj pagis membrajn kotizojn kaj daŭrigas en kurso progresanta, gvidata de Dr Hrneček. Kunvenoj nun en kafejo Londýn (unua etaĝo) ĉiumerkrede je la 20—22 h.

Veprty. — Nia regiona peranto F. Patera, kiu patre zorgas pri la konfidita regiono Karlovy Vary, estis agrable surprizita, kiam lia inspekta vizito al kurso de Esperanto en Veprty estis kvarfoje avizita de la urba disaŭdiĝo. La kurson gvidas juna samideano Vacek, instruisto, devenanta el Praha, kiu veturas en la kursejon el distanco 12 km. Li instruas en rondetoj. Ĉeestis 12 kursanoj. La klubo posedas propran klubejon kun du ĉambroj, antaŭĉambro kaj akcesoraĵoj. Klubestro s-ano Král, oficisto de la Distrikta Nacia Komitato, establis senpage la klubejon. Sur la poŝtofiĉejo estas fiksita varbkesteto. Ankaŭ la loka disaŭdiĝo varbas por la kurso. La kursanoj aliĝis al la Asocio. (jm)

Vsetín. — Du kursoj por komencantoj dum tiu ĉi vintra sezono. La unua komenciĝis la 7. IX. 1949 kun 21 p., finiĝis per aliĝo de 9 p. al la klubo. Dua, sen ia ajn reklamo (pro nura anonco en la elmontra kesteto) komenciĝis kun 15 p. la 11. I. 1950 kaj daŭras kun 12 p. Instruas en ambaŭ prez. A. Berka laŭ sia lernolibro. — Estis decidite fondi kluban bibliotekon; estis aĉetitaj de la Asocio libro-vendejo ĉiuj riceveblaj libroj, sed tio ne sufiĉas kaj la klubo petas proponi al ĝi E-librojn kaj aliaj E-aĵojn. — La membraro legas: Ĉiu ricevas „Esperantistan“ kaj krome estis akiritaj dek novaj abonantoj por „E. Slovaka“ kaj la membroj promesas devige legi E-librojn aŭ partojn el ili kaj raportoj pri ili en la kunvenoj. Tiamaniere estas pliriĉigata programo de la kunvenoj, la spertoj estas surprize bonaj kaj ni rekomendas provi tian aranĝon en aliaj kluboj. — La kunvenoj okazas ĉiumerkrede en hotelo Pančava. Krom organiza vivo estas sur programo kurso progresanta laŭ „Ellerni“ kaj krome „kvinminutoj“: ĉiu membro devas prezenti temon libere elektitan en diskurso kvinminuta, post kiu sekvas diskuto pri la temo. Ĝis nun temis pri: Kiel mi fariĝis esperantisto kaj miaj spertoj ĝisnunaj (Berka), Kristanismo kaj Esp. (Bednařík), Popolaj kutimoj de Valaĵoj (Machala-Hurtiková), Malfacila la vivo de maŝingvidanto (Riedl), Masaryk kaj lia vivo (Hurtiková), El E-vivo (Zajíc), Mia pasintjara ferio aŭ la belaĵoj de Slovakujo (Chovančík). Ĉiu samideano veninta en Vsetín estas invitata veni en la klubon kaj diri sian „Kvinminuton“. — Jarkunveno okazis la 11. I. Estis elektita prez. Aleš Berka, sekretario Josef Zajíc, kasisto Chovančík, propagandisto S. Riedl.

STRANGA KAPTAĴO

Ĉe roka bordo bobelas
kapricaj ondoj en la sun',
ruliĝas tie kaj ŝvelas,
kaj ŝaŭme cedas nun.

Por petoladi multmove
revenas ili de la fund',
perliĝas, poste denove
murmuras en profund'.

La maro muĝas akorde;
sonĝante ora pri fiŝet',
fiŝisto juna surbörde
dormetas en kviet'.

Leviĝas alte la maro,
baraktas io en la ret',
kaptiĝis ora hararo
de l'mara virinet'.

E. Urbanová-Doubravská

RICEVITAJ LIBROJ

Interlingual Scientific and Technical Dictionaries. A report by J. E. Holmstrom, Ph D. Unesco NS-SI-1, Paris, 20 July 1949. 66 paĝoj 21×34 cm, ciklostilitaj, kaj du detalaj aldonoj. — Nereguligata evoluo de sciencteknika lingvo kondukas al komplikiĝo de faka terminaro, diversenceco kaj multsignifeco de terminoj kaj simboloj. Tio estas kaŭzo de diversaj perdoj, ĉar evoluo de tekniko estas per tiu nereguligiteco de la teknika lingvaĵo malfaciligata. Tiuj malfaciloj havas apartan gravecon en organizo de internaciaj sciencaj rilatoj. Rezultis el tiu stato bezono normigi science teknikajn nociojn, terminojn kaj simbolojn. La verko farita de J. E. Holmstrom, komisiita de Unesco, kolektis la spertojn pri sciencaj kaj teknikaj vortaroj. Multaj terminoj en tiuj vortaroj diverslingvaj ne interrilatas reciproke pro diversaj kaŭzoj. Iam pro nesufiĉa scio de aŭtoro, sed pli ofte, ĉar vortoj, kies lingva aspekto ŝajnas la sama aŭ tre simila en gravaj lingvoj, havas en ili signifon diferencajn, precipe se oni atentigas diversan nuancon de la termino. Tial oni devas dediĉi al kompilo precipe de plurlingvaj vortaroj fakulan atenton. En ili oni ofte uzas sistemon de indeksnombro, kiu estas la sama por ĉiu lingvo. Oni rekomendis, ke la indeksnombro estu tiu de la Internacia Dekuma Klasado. La aŭtoro ne rekomendas tiun proponon, ĉar ĝi tro dependas de kompleto de la Dekuma Klasado en koncerna lingvo, sed tiu ne estas en ĉiuj lingvoj sufiĉe kompleta, kaj krome estas tre malfacile memorteni la longajn numerojn de tiu klasado. La aŭtoro rekomendas uzi anstataŭ kodnombrojn kodvortojn, kiuj servas kiel „pontoj”, kaj tiuj vortoj estu el Esperanto. Ni citas laŭvorte koncernan paragrafon (4.10): „Alternative la „pontlingvo” por tiu celo povus esti Esperanto, kiu estante artefarita evitigus naciajn jaluzojn kaj krome prezentus aliajn avantaĝojn. La esperanta gramatiko estas tiel simpla, ke post kiam ĝia vortaro estas alkondukata al la atento en ĉi tiu maniero, la veraj tekstoj prezentigas kiel simpla pleniĝaĵo facile komprenebla. (La aŭtoro trovas, ke li povas kompreni la plejmulton de „Scienca Revuo”, la nova kvaronjara eldonaĵo, sen malfacilo, malgraŭ tio, ke li ne antaŭe provis lerni Esperanton.) Se Esperanto populariĝus en ĉi tiu okaza maniero inter la sciencistoj kaj teknologoj, ĝi prezentus multajn praktikajn profitojn en aliaj direktoj; ekz. la disvastigo de resumoj kaj la forigo de interpretado dum internaciaj konferencoj. La Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj ĝiaj filiaj naciaj societoj aŭ mem aŭ per kuraĝigo al aliaj, respondecis pri konsiderinda nombro da sciencaj kaj teknikaj eldonaĵoj inkluzive vortaroj ligantaj Esperanton kun aliaj lingvoj, kiuj estas cititaj sub siaj fakoj en Aldono I, kaj aliaj estas farataj. Kunlaboro de tiuj societoj estus volonte donata.” — Tiu grava aserto de Dro Holmstrom estas lia opinio persona, sed dirata en raporto pri esploro farita por Unesco ricevas apartan aŭtoritan signifon krom tiu, kiu eliras simple el ĝia rilato al faktoj kaj logiko. Ni estas tre kontentaj, ke jam dua numero de nia revuo povas raportari pri plua pozitiva sinteno de Unesco al nia afero. Kaj ni diru nian konvinkon, ke Unesco komencos baldaŭ el propra iniciato sisteman esploron de problemo, kiel uzi Esperanton por internacia kontakto sur sciencista tereno en pli vasta amplekso.

Zdeněk Hubka: Cizinec před pultem. Vydalo Tiskářské a vydavatelské družstvo čs. obchodnictva, Praha II, Žitná č. 45. 16 paĝoj 12×48 cm. Kun 20 varolistoj. Prezo 39,— Kčs, varolistoj po 8 Kčs. — Celo de tiu presajo estas doni al butika vendisto eblecon, ke li prezentu al fremdlanda kliento laŭ lia lingvoscio liston de bezonaj demandoj kaj respondoj en lingvoj rusa, angla, franca, hispana, germana, Esperanto. Laŭ bezono li prezentos same liston de varoj el 20 diversaj branĉoj kaj la kliento povas per fingro montri, kion li deziras. La esperantlingva teksto estis farita tre lerte de Jar. Mařík. La tradukado ne estis laboro facila, temas ja pri listoj de tre diversaj komercaĵoj teknike nomitaj. Rezultis el tiu laboro 20 listoj, kiuj estas tre utilaj ankaŭ por ni ne tiom kiel klientoj en fantaziaj butikoj, sed kiel interesuloj pri faka terminaro. Ne ŝajnas, ke ideo de la aŭtoro havis tro grandan resonon. Sed s-o Mařík meritas gratulon pro sia tre bone farita laboro traduka.

Daniel Quarello: Komplementoj de l' verbo. Libro-gvido por niaj verkistoj, tradukistoj kaj literaturamantoj. Quarello & Cia eldonistoj. Casilla de Correo 47 (Suc. 13), Buenos Aires. 32 paĝoj 15×20 cm. — Ĝi estas III-a parto de la libro „Lernu Esperanton”, paĝoj 65—100. Ĝi traktas la komplementojn de l' verbo similmaniere kiel traktis la dua parto Komplementojn de l' substantivo. La aŭtoro ne uzas la saman gramatikan terminaron, kiun enkondukis Plena Gramatiko. Sed ĝi ne tro malhelpas al uzo de lia verko, ĉar li prezentas siajn asertojn en tre klara kaj simpla maniero. Krome enestas multaj ekzemploj kaj la kerno de la libretoj enestas en ili. Malofte oni trovas strangaĵon, kun kiu oni ne povas konsenti, aŭ kiu estas erara. Ekz. „En la tago, ke mi vidis ŝin” nepre devas esti: „kiam mi vidis ŝin”. „Morgaŭ mi iros ĉe mian onklon” estas treege nekutima; ĝi volas versimile diri, ke mi iros en la hejmon de mia onklo; sed en la ĉeĥa oni ne povas tiun „iron al ia loko” ankaŭ esprimi alimaniere ol per „mi iros al mia onklo” kaj mi pensas, ke por Esperanto ĝi ankaŭ povus sufiĉi. „Mi iros ĉe mian onklon” ne estas kontraŭ logiko, sed oni devas nun respekti ankaŭ tradicion, precipe en lernolibroj. Nebonajn ekzemplojn mi trovas tre malofte. La donataj difinoj estas klaraj kaj la ekzemploj tre bonaj precipe pro ilia simpleco. Leginte atente la libreton sperta esperantisto multon akiros por sia lingvouzo. Sed li trovos afero stranga prezenti prepozicion „cis” kvazaŭ ĝi estus oficiala aŭ ofte uzata, kvankam oni preskaŭ neniam legas ĝin kaj krome ĝi ŝajnas al ni nebezona, oni ja ne bezonas esprimi tiun rilaton. Same „ĝis” kun infinitivo estas tre malofte legata kaj aŭdata, mi tion trovas erariga. Sed, kiel dirite, la verko meritas atentan legadon kaj studadon kaj certe utilos.

Jarlibro de Universala Esperanto-Asocio 1950. Unua parto. La enhavo de tiu ĉi Jarlibro ne povas esti represetata, ĉu tute, ĉu parte sen permeso de UEA. Copyright by Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo. Nur por uzo de membroj. 240 paĝoj 12×15 cm. — La fama jarlibro aperas en konate bela aranĝo kaj zorga redakto. Membroj de UEA estas nun en 74 landoj, sume 863 membroj kun Jarlibro kaj 4429 membroj abonantoj, 365 Subtenantoj, 17 Patronoj, 193 Dumvivaj, 60 Helpmembroj. Asociaj membroj estas 12.822. La denseco de tiu reto efektive tutmonda estas tre varia. El Ĉeĥoslovakio estas sole 1 membro kun jarlibro kaj 49 abonantoj, al kiuj ĉiuj tion ebligis sole adoptintoj el ceteraj landoj, ĉar ni ne povas sendi monon en fremdlandon. El Hungario estas 147 individuaj membroj, kiuj povis pagi. Deleĝitoj estas en 990 lokoj de 54 landoj. La listo de „Esperantista gazetaro” enhavas 46 titolojn. Ni miras, ke mankas en ĝi „Esperanto-Servo”, aperanta jam la trian jaron; kompare kun pluraj esp. gazetoj ĝi estas tre enhavoriĉa, du paĝoj de la granda formato dense presitaj liveras multon por legi kaj pripensi; ĝi estas tendenca, sed tio meritas laŭdon, ne silenton; ke ĝi ne estas vendata sed senpage dissendata, tio certe ne estas manko sed aparteco konstatinda. En la Jarlibro estas tre leginda Listo de la plej gravaj verkoj, aperintaj en la lastaj du jaroj; ĝi estas tre utila kaj daŭriginda listo; sed ankaŭ en ĝi ni trovas, ke ne enestas „Ĉeĥoslovaka Konstitucio” kaj „Lerneja Reformo en Ĉeĥoslovakio”; temas pri verkoj gravaj, dissendataj senpage, sed multe pli enhavoriĉaj ol pluraj el tiuj enlistigitaj; tiuj du broŝuroj ja enhavas 72 resp. 58 paĝojn tre dense presitajn, en tre bona traduklingvaĵo, pri temo ekstreme aktuala. Alia tre utila listo en la Jarlibro estas Mallongigoj konstante uzataj en la Esperanto-Movado. Gravaj estas ankaŭ finaj ciferoj pri la Petskriba Kampanjo; sume estis kolektitaj 16,350.212 subskriboj, inter ili 1,201.154 el Ĉeĥoslovakio. La Jarlibro estas grava pruvo de vivanteco de nia movado, kiu vivas internacie eĉ dum tiu ĉi tempo, kiam internaciaj rilatoj estas tiom malfaciligitaj. Ankaŭ laŭ la ekstera aspekto la libro estas tre plaĉa. La redaktintoj akceptu dankon de la movado.

Iv. Vazov, Vagabondoj. Novelo kaj kvar rakontoj. El la bulgara tradukis Iv. Kovačev. Eldonis Bulgara Esperantista Kooperativo, Sofio, Presis Presejo „Esperanto” de tiu kooperativo. 112 pĝ 14×20 cm. (Ni informos per speciala

anonco, se nia Librovendejo povos ĝin liveri.) — Nunjare festis bulgaroj centan revenon de dato, kiam naskiĝis Ivan Vazov (1850—1921), unu el la elstaraj verkistoj de tiu popolo, aŭtoro de poemoj, kiuj fariĝis nacia propraĵo de bulgaroj. Vazov havas ankaŭ grandajn meritojn pri pliriĉigo de bulgara literatura lingvo. Per siaj verkoj, plenaj da revolucia spirito, li kunhelpis liberigi sian popolon, kiu nun sukcese marŝas al socialismo. La prezentitaj kvar noveloj estas malgrandaj juveloj el lia verkaro. Ili instruas nin, kion la bulgaroj travivis, antaŭ ol ili elbatalis sian liberon. La lingvo de la traduko estas bona, flue kaj agrable legebla, preseraroj malmultaj. Havinda volumeto!

(O. G.)

Leteroj el mia muelejo (Kajero 1) de Alphonse Daudet. Tradukita de Mijake Ŝihej. Tokio. Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati 1—13, 1949. (Internacia Biblioteko de JEL—1.) 80 paĝoj 11×15 cm. — Ne estas unuan fojon, kiam aperas traduko el la franca lingvo fare de Japano. Tiu ĉi traduko de klasika verko estas prezentita per lingvaĵo tre klara kaj tre laŭvorta. En la antaŭparolo la tradukinto klarigas, kial li tradukis el la franca kaj ne el la japana: li „volis doni specimenojn de fremda stilo al novaj japanaj esperantistoj, al kiuj mankas rimedoj havigi al si eksterlandajn eldonaĵojn“. Sed lego de la libreto estas utila ankaŭ al Eŭropano. Oni trovas ie tre trafajn esprimmanierojn. La tradukanto eĉ imitas provencan dialekton, kiu estis uzita de Daudet por karakterizi etoson de la loko kaj dialogon de personoj. La tradukinto aldonis multajn klarigantajn piednotojn, kiuj utilos al ĉiu leganto. Kaj li pruvis sian grandan lingvistikan talenton.

A-B-C-libro. Strofoj de Nenjo Rimanto, Bildoj de Brian Lesli. Kopirajto rezervita. Copyright, Eldonita de The Esperanto-Publishing Company LTD, Heronsgate, Rickmansworth (Herts), Anglujo. 16 paĝoj 13×20 cm. — Ĉiu litero de la E-alfabeto estas rememorigata per bestobildo kaj kvarversa strofo. Sole por I estas „infanoj“ kaj por J estas „jokeo“. La versoj estas plaĉaj pro sia naiva enhavo kaj tre bona ritmo, la bildoj estas tre bone desegnitaj kun akcentoj sur komikaj trajtoj. La libreto estas presita sur dika papero kaj tre plaĉos ne sole al la infanoj sed

ankaŭ al la gepatroj. La eldonintoj diras sur la kovrilo: „En Esperantujo nuntempe troviĝas multaj infanetoj, kiuj lernis samtempe la gepatran lingvon kaj Esperanton. Tamen, kiam por tiuj etaj infanoj oni serĉas legmaterialon, oni konstatas, ke ekzistas en Esperanto preskaŭ nenio por ili.“ Sed, kiel mi diris, la libreto estos kun ĝuo legata kaj relegata de multaj komenculoj. Ni citu kiel specimeno:

L por leono
kun nobla aspekto,
de bestoj la reĝo
laŭ homa elekto.

George Fox. Fondinto de la Religia Societo de Amikoj (Kvakeroj) (1624—1690) Henry van Etten. Friend Service Council, Friends House, Euston Road, London, N. W. 1. Prezo 3 d. 16 paĝoj 12×18 cm. (Junio 1948, 5000 ekz.) — La broŝuro en klara kaj simpla stilo informas pri la vivo kaj idearo de tiu ĉi eksterordinara homo. La lingvaĵo de la traduko estas tre bona kaj iĝas la legadon tre agrabla.

Esperanto: The World Interlanguage. Compiled by George Alan Connor, Doris Tappan Connor, William Solzbacher, The Very Rev. Dr. J. B. Se-Tsien Kao. New York: The Beechhurst Press. 246 paĝoj 13×18 cm. — Detala lernolibro amerika aperinta en 1948. Precipe laŭdinda estas enkonduka parto anglalingva, kiu donas sur 30 paĝoj skizon pri teorio kaj historio de internacia lingvo. Dua parto estas detala lernolibro, kiu komencas instrui tuj konversacion. Ĝi estas sur 60 paĝoj. El gramatikaj partoj mi ekzemple laŭdus klarigon pri uzado de je. La konversacioj strebas kun sukceso al bona humoro; ekz. sur p. 49, kie s-ro Adams iras en magazenon por aĉeti cigarojn kaj aĉetas krome „modernan luksan horloĝon“ por 80 dolaroj. Tria parto estas legolibro, ne tro ampleksa, sed kun interesaj tekstoj. Kvara parto estas anglalingva gvidilo por praktika uzo de Esperanto kun tre valoraj kaj instigaj indikoj pri literaturo, apliko de Esperanto en tre diversaj fakoj, uzo de ŝlosiloj, komerca korrespondado, organizajtoj de kolektantoj ktp. Sekvas vortaroj E-angla kaj angla-E. La tipografia aranĝo de la libro estas tre plaĉa. Apero de tiuspeca lernolibro mem estas dokumento, ke nia afero progresas ankaŭ en Usono.

ESPERANTISTA VIVO

Mortis Květa Erbenová, oferema membrino de la E. K. en Liberec, en marto 1950, per morto tragika. Honoron al rememoro pri ŝi!

Mortis Alois Jašek, estro de Regiona muzeo en Bojkovice, granda propagandisto de Esperanto en lernejo, kie li instruis kiel faka instruisto. Li intencis fondi Esperanto-muzeon en Bojkovice kaj tiel pruvi al loĝantaro de ĉirkaŭaĵo kaj al ĉiuj vizitontoj, ke Bojkovice, regiono de J. A. Komenský, bone komprenis ideon de Esperanto. Sed morto, la 8-an de majo, rompis lian pluan laboron en lia netuta 50-jara aĝo. La familio akceptu nian sinceran kondolencan! (ONJA)

Edziĝo. Jan Dominik kaj Marie Marečková el Brno, en majo 1950. Gratulon sinceran!

Naskiĝo. Al familio de prezidanto de la grupo en Jihlava Křižanovský naskiĝis en junio filineto. Gratulon al gepatroj kaj deziron de prospero al la nova civitanino.

Alois Kubala en Ostrava sesdekjara, la 19. VI. 1950. Klubo, kies li estas prezidanto, salutas lin per sekvanta letero:

Samidean Alois Kubala naskiĝis en Slezské Ostravě dne 19. VI. 1890 v době hornických demonstračních událostí. Jako syn horníka prožíval své mládí v neutěšených poměrech tehdejší doby. Bylo mu 15 let po vyjití obecné školy, když se již ubíral za svým tátou do dolu „jámy Terezie“, aby svým skrovným výdělkem vypomohl početné rodině. Byl chlapcem nadaným a proto, když se dověděl o světovém mezinárodním jazyku esperantu, pojal ihned myšlenku tomuto jazyku se učít. — Již v sedmnácti letech se věnuje pilně studiu tohoto jazyka a zůstal věren této krásné mezinárodní myšlence. — Pro své vrozené nadání prošel horní školu s velmi dobrým prospěchem a v roce 1915 fýral již jako dozorce na jámě „Terezie“. — Přes veš-

kerou namáhavou důlní práci věnoval se dále studiu esperanta a v roce 1921 zakládá spolek ve Slezské Ostravě-Kamenci, který je dosud činným. — V roce 1922 zakládá opět v Heřmanicích spolek, ten však neměl, bohužel, dlouhého trvání i přes řádné vedení, neboť předseda tohoto spolku stal se obětí explozivní katastrofy. V roce 1946 zakládá zdejší spolek esperantistů „Komenský“ v Ostravě-Zábřehu-Družstvě, ve kterém je dodnes vzorným učitelem a rádcem. Spolek je velice agilní a čítá 198 registrovaných členů. V roce 1947 zakládá Kubala spolek v Darkově, který také přináší dobré plody na blízké hranici polského území. — Ani vleklá a nebezpečná choroba, administrativní zatížení a stále studium neodradily samideana Kubalu, aby v r. 1947 nevykonal s velmi dobrým prospěchem zkoušku způsobilosti vyučovat esperantu na školách a kursech.

Dnes, 19. VI. 1950, k jeho požehnaným a slavným šedesátinám, a současně k jmeninám, jeho plodného a bezúhonného života blahopřejeme našemu jubilentovi a přejeme mu do druhé šedesátky mnoho štěstí a hlavně dobrého zdraví. Spolek esperantistů „Komenský“, O.-Zábřeh-Družstvo.



Tiskoví referenti. Je záhodno, aby každá odbočka si zvolila tiskového referenta, který se stará o uveřejňování zpráv o esperantském životě v místním tisku. Referent dostává od svazu „Gazetara servo“ s českými články, již připravenými k otištění. — Hlaste jméno a adresu referenta svazu a zároveň samid. Františku Pytlounovi, Hradec Králové, Zamenhofova 1010, kde je expedice G. s. Tam zároveň dostanete tiskopis s poučením, jak si počínat.

KORESPONDI DEZIRAS

Venelin Ĥitilov, Republika 84, **Burgas**, Bulgario, pri ĉiuj temoj, ankaŭ intĉ. pk., pm. kaj gazetojn.

Oficisto, 26-jara fraŭlo, dez. koresp. kun juna samideano. Miro Závodský, **Žilina-Závodie** 197.

F-ino Pietje de Jonge, Zuidveen 110, **Steenwijkerwold**, Nederlando.

E. G. Ernst, Frieseweg 24, **Oldemarkt**, Nederlando.

Vratislav Ouhrabka, 19-jara sukerajisto, **Bozkov** u Semil 208, kun esp. de la tuta mondo, ankaŭ el ĈSR.

Frans Lombaerts, 18-jara studento, Haachtse Steenweg 111, **Kamphenhout**, Belgio, kun samideano el Praha pri laŭdeziraj temoj.

Infanajn desegnajojn mi bezonas por ekspozicio aranĝota. P. Cley, instruisto, Lingestraat 16-B, **Groningen**, Nederlando.

Interlingue? Co to je? Je to jen nové jméno, nikoliv nová věc. Je to nový název occidentalů, neživotné splepeniny prvků z jazyků **západoevropských**, vlastně jen prvků románských, které occidentalisté (occident = západ) hlučně vyvyšují proti esperantu, jemuž s nepřičetnou zlobou vytýkají některé slovanské prvky (říkají opovrhlivé „barbarismy“) a slovanský ráz skladby. Poznavše, že nejen jazykový ráz, ale i jméno occidentalů a propagační manýry a triky jeho nečetných, ale lomozných stoupenců, budí oprávněný odpor příslušníků národů východních, zejména slovanských, rozhodli se změnit dnes nepohodlný název svého výpotku a snaží se plouti pod novou, falešnou vlajkou, falešnou proto, že „nový“ název vzat je jménu mnohem staršímu, stejně papírovému, dnes neznámému projektu „interlingua“. Lze bezpečně říci, že tato zálužná změna názvu occidentalistům nepomůže, jako jim nepomáhá podvodná propaganda falšovanými porovnáními, která mají másti lidi neinformované a váhavé. Esperanto za šedesát let prokázalo dokonale svou životnost a plodnost, zatím co occidental za celá desítiletí se nemůže uchytit pro svoji neživotnost a neplodnost, pustou sterilitu. Proto lze bezpečně říci, že vlna času occidental, či interlingue odplaví, zatím co **esperanto bude žít a nezadržitelně postupovat** navzdory herostratství fanatiků, kterým působí radost poškozovat dobré a užitečné dílo, když se jim nedaří získávat lidi pro pochybné dílo své. Věcnou kritiku occidentalů, tedy interlingue, podal „Esperantista“ ve IV. roč. na straně 64. (Kv.)

LETNÍ KURSY ESPERANTA VE SVITĚ POD TATRAMI

5—19. VIII. 1950

Místní osvětová rada ve Svitě pod Tatrami na Slovensku uspořádá za spolupráce esperantského kroužku při ROH a komitétu Letní koleje esperanta v Doksech v době od 5.—19. srpna t. r. řadu odbor. kursů (základní, pokračovací, konverzační, vyšší, cvičný kurs po učitele Če-metodou a řečnický). Vyučují čeští a slovenští odborníci. Dopoledne vyučování, odpoledne zábavné podniky, vycházky a zájezdy do Vysokých Tater. Večer tanec a program v kavárně Společenského domu. Celodenní autokarový výlet 13. VIII. do ledové jeskyně Dobšinské a krápníkových jeskyní v Domici. — Kolejně za kurs a ubytování společně 1150 Kčs, v soukromí 1300 Kčs. Cena jízdného autokarem počítá se zvláště. Stravné si hradí každý sám. Cena stravného na slevenky činí asi 600—650 Kčs. Potravinové lístky s sebou! Počet účastníků omezen. Termín přihlášek do 10. VII. Sleva na čs. drahách do Svitů a zpět 50 procent. Přihlášení po 8. VII. slevu již neobdrží, ježto průkazky musí být odevzdány ředitelství ČSD k potvrzení. Bližší informace v prospektu, jež i s ofic. přihláškou si vyžádejte u pana M. Nováka, přednosty pošt. úřadu ve Svitě na Slovensku. Do vidění vo Svitě! L. K. E. S.

Somera kolegio de Esperanto en Doksy 15.—29. VII. 1950

V. zpráva:

15. července zahájí (po páté) řadu odborných kursů esperanta, o nichž referováno již v předešlých zprávách. Bližší informace jsou v prospektu, jež na žádost zašle p. K. Šolc, jednatel LKED, Mladá Boleslav I, 41. — Účastníci kursů mají 50proc. slevu na čs. drahách od 13.—31. VII. do Doks a zpět na průkazku, již obdrží po řádné přihlášce a zaplacení kolejného v částce 1694 (nikoli 1494), jehož zvýšení přivedlo náhle zvýšení ubytovacích sazeb v místě a změna kalkulačních předpisů stravovacího podniku. Slevu na dráze obdrží jen ten, jehož přihláška na ofic. blanketu došla do 25. VI., ježto průkazky musí být potvrzeny ještě ředitelstvem ČSD a vráceny pak přihlášeným. — Na shledanou v Doksech! L. K. E. D.

II. letní kursy esperanta v Rožnově p. Radhoštěm

pod záštitou Lidové akademie
budou letos od 15. do 29. července.

Program kursů:

1. Kurs pro začátečníky.
2. Kurs pro pokročilé.
3. Kurs pro kandidáty na učitele esperanta a překladatele (vede R. Hromada).

Odpoledne vycházky a výlety do malebného okolí, večer zábavné programy.

14denní pobyt s kursovným a lázeňskou taxou při společném ubytování Kčs 1.450.—, v hotelu 1.700—1.750.—, v soukromí Kčs 1.560—1.630.—.

Přihlášky přijímá a informace podává za Esperanto-Klubo: s-anino Marie Skařupová, Ostrava I, ul. 1. máje 104.

Esperantské léto v Karlových Varech

Příjemnou a zároveň velmi užitečnou dovolenou můžete strávit lacině a v radostném esperantském prostředí ve světových lázních Karlových Varech. Můžete tak posílit své zdraví i své znalosti esperanta, zúčastnit se Mezinárodního filmového festivalu, Karlovarského kulturního léta atd. Ziskáte tak zážitky nezapomenutelné. — Přihlaste se proto ihned do některého z těchto kursů:

Od 9. do 22. VII.: Kurs esperanta pro začátečníky.

Od 23. VII. do 5. VIII.: Konverzační kurso por progresantoj.

Od 6. do 19. VIII.: Supera kurso por kursgvidontoj.

Denně 4 hodiny vyučování, zbytek dne výlety, účast na lázeňském životě a p. — Výlety do nádherného okolí. — Poplatek za kurs 1.800 Kčs včetně ubytování v pensionu, stravování, kursového, vstupného na kulturní a zábavní podniky kursu a autokarového zájezdu do západočeských lázní. Pro pracující a studující mládež poplatek pro začátečnícký kurs 1.000 Kčs. — Vyučují členové zkušební komise svazu esperantistů ČSR. — Pro jízdu vlakem do Karlových Var a zpět obdrží kursisté 50% slevu. — Přihlášky přijímá odb. učitel Antonín Reček, Karlovy Vary Stalinovo nám. 5, kde též obdržíte podrobné informace

Krajský výbor Svazu esperantistů ČSR, kraj Karlovy Vary.

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel a nakladatel Svaz esperantistů ČSR v Praze II, Malá Štěpánská 7. Odpovědný zástupce listu Dr Stan. Kamarýt. Členům Svazu zdarma. Členství příspěvek 100 Kčs. Účet pošt. spoř. 9.602. Tiskne Grafia v K. Varech. Účast na poštovní novinové službě povolena řed. pošt. v Praze č. j. IA-Gre-2372 OB-48. Dohlédací poštovní úřad Praha 022.